

# P A C O

OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

---

4.jaro/ No.34-35.

ĈEĤOSLOVAKA ELDONO

Sept.-oktobro 1956

---

## POPOLDEMOKRATAJ ESPERANTISTOJ OPINIAS, KE NIA MOVADO JAM ESTAS SUPERFLUA

Stranga titolo.— Certe ĉiu pac-amiko tuj kun avideco klopodon trovi pluan klarigon. Ankaŭ mi estis iom surprizita, kiam eksciis ĉi raporton el la kunsido de MEM-anoj, okaziĝinta dum la Universala Esperanto Kongreso en Kopenhago. Tiun kongreson post longaj jaroj denove sukcesis partopreni esperantistoj el popoldemokrataj landoj. Sed ŝajnas, ke kelkaj el ili preferis ĝui persone la internacian balon anstataŭ ĉeesti gravan kunsidon de esp.pacdefendantoj (MEM), kiu unua foje okaziĝis en la kadro de la UEA-kongreso.

Estas ja komprenebla, ke por esperantistoj, kiuj dum jaroj, aŭ eble ankoraŭ neniam en sia vivo havis la eblecon partopreni tian kongreson, internacia balo estis tre alloga senzacio. Sed kiam el 2.200 kongresanoj nur 30 partoprenis la MEM-kunsidon, tio tamen estas konsiderinda afero. Kvankam por la MEM-kunsido la tempo estis neĝuste disponigita, paralele kun la balo, tamen la pacamikoj estis povintaj dediĉi almenaŭ unu horon al tiu grava kunsido k. poste ili estus povintaj ankoraŭ sufiĉe ĝui la balon. Sed jam okazis tiel kaj ni nur estonte povos klopodi eviti ripetigon.

Dum la MEM-kunsido unu k-do. supozis, ke ni povas akiri oficialan apogon por la MEM-laboro en la kadro de UEA kaj verŝajne opiniis, ke tio estus la plej bona solvo. Bulgara k-dino, kiu ne partoprenis la kunsidon, en privata diskuto kun k-do. Kvist el Svedio kaj Balkányi el Hungario tute ne konsideris MEM kiel necesas movadon, kaj ĉina k-do. diris, ke ja ĉiu esperantisto estas pacamiko kaj demandis, ĉu ne UEA sufiĉus por la paclaboro. La kunsidon ankaŭ ne partoprenis ĉeĥoslovakaj kaj polaj reprezentantoj, kvankam laŭ kongres-raportoj ili aliĝis.

Do stariĝas vere stranga opinio, ke UEA sufiĉas fari la pacbatalon kaj la Mondpaca Esp-ista Movado (MEM) fariĝas superflua.

Kvankam temas nur pri opinioj de unuopuloj, tamen necesas trovi klarecon. Verŝajne la gek-doj ne estis sufiĉe bone informitaj pri la eblecoj de porpaca agado en la neŭtralaj Esp-organizoj de kapitalistaj landoj, kiam ili opinias, ke en ties kadro la paclaboro sufiĉus. Unue la neŭtralaj organizoj devas sian tutan forton koncentrigi ĉefe por la disvastigo kaj propagando de Esp-o mem. Sekve ili sin povus okupadi per la paclaboro nur apude. Tial necesas havi aparatan tutmondan esp-pacmovadon en kiu la esperantistoj speciale kaj ĉiamaniere eluzu la lingvon por propagandi kaj defendi la mondpacon.

MEM povas kaj devus havi siajn sekciojn kaj fakojn ne nur en la Universala Esperanto Asocio (UEA), sed ankaŭ en SAT, en la Katolika Ligo, en fervojista, junulara kaj aliaj internaciaj Esperanto-organizoj. Sed por povi doni direktivojn k. organize gvidi tiujn, estas nepre necese havi tutmondan movadon kun sia centro (estraro), delegitoj kaj sekcioj en ĉiuj landoj. Ni ne povas postuli, ke la estraroj de aliaj organizoj organizu la pacdefendon, ĉar tiuj havas jam sufiĉe da laboro per la organizado de la Esp-movado kaj propraj interesceloj. Ili povas nur helpi kaj per sia influo apogin agadon, sed organizi kaj batali devas la pacdefendantoj mem. Due ni konsideras MEM kiel parton de la Monda Pacmovado, servanta al ĝi pere de la internacia lingvo. Sekve ni ne povas esti samtempe parto de UEA, sed ni povas havi en UEA kaj aliaj internaciaj organizoj niajn fakgrupojn, kiuj kunlaboros kun ties membraro.

En Ĉeĥoslovakio ekzemple fondizos la 20-21. de okt. 1956 Tutŝtata Esperanto Unio. En ties kadro kreigos diversaj sekcioj, inter ili ankaŭ sekcio de esperantist.pacdefendantoj (MEM). Tiu ĉi sekcio dense kunlaboros kun la centra landa organizo, sed havos sian propran prezidanton kaj gvidadon. Ĉi laboros laŭ direktivoj de MEM. La landa asocio, respekt.ĝia centra komitato transprenos la eldonadon de "PACO" kiam vicas Ĉeĥoslovakio kaj donos en sia centra organo, kiu estos presita, 1-2 paĝojn al dispono por la Esp-pacmovado La landa asocio fariĝas membro de UEA, sed antaŭ ĉio, kiel asocio de popoldem.lando, ĝi kompreneble kunlaboros kun MEM.

Tiel estas en Hungario, en D.D.R., en Sovjet-Unio kaj tiel devus esti ankaŭ en la ceteraj popoldem. landoj. En landoj kun aliaj reĝimoj la situacio ankoraŭ ne ĉie estas tiom matura, sed estas dezirinda, ke ankaŭ en tiuj landoj niaj gek-doĝoj klopodu akiri la saman apogon ĉe siaj landaj asocioj.

Tute erara estas la opinio, ke ĉiuj esperantistoj estas pacamikoj. Ni havas konkretajn faktojn, sed eĉ el popoldemokrataj, ke esp-istoj rifuzas propagandi pacon per Esperanto, ĉar ili erare vidas en tio politikan agon kaj opinias devi konservi severan neŭtralecon en la Esp-movado. Aliaj kredas, ke ili jam kiel nuraj esperantistoj mem, per propagando de la internacia lingvo k. ties instruado faras sufiĉe por la mondopaco. Ambaŭ tiuj opinioj estas *eraraj*. Zamenhof ne kreis Esperanton por ke ĝi trankvile ripozu kaj estu neŭtrala inter paco kaj milito. Zamenhof ĝin kreis por forigi nacian ŝovinismon, malamikecon inter la popoloj kaj militoj. Tio evidentiĝas tute klare el la himno, kiun li mem verkis. Nur esperantistoj, kiuj ne komprenas la sencon de nia himno, povas ne scii la taskon de la lingvo. Kaj se iuj opinias ke Esperanto nur jam sufiĉas por forigi militojn, ankaŭ ili eraras, ĉar Esperanto povas servi kiel ilo en la batalo por la paco kaj same ĝi povas servi ankaŭ al propagando de milito. Tial ne sufiĉas nur esti bona esperantisto, sed necesas kiel tia ankaŭ praktike eluzi ĉiujn eblecojn, kiujn tiu lingvo al ni donas, por la defendo kaj sekurigo de la paco. Tiamaniere ni kunfandiĝas kun la Monda Pacmovado kiu kalkulas milionojn da anoj en la tuta mondo kaj en ties kadro pro nia aktiva kunlaboro pere de Esperanto ni samtempe grave kontribuas al la Esperantomovado mem.

Jenajn grandajn taskojn atribuis al si la Mondpaca Esperantista Movado kun siaj sekcioj kaj anoj en la tuta mondo. Ilin kapablas plenumi nur bone organizita aparta movado. Tial, ĝis kiam en la mondo okazistos kapitalistoj, militinstigantoj, armilproduktantoj, armeoj kaj atombomboj, nepre necesas la ekzisto de Mondpaca Konsilantaro kaj ĝia paralela organizo „MEM“!

Rud.BURDA prez.de MEM

## POR KE LA HOMARO TRANKVILIĜU

Estas nekontastebla fakto, ke lastatempe iom sereniĝis la politika horizonto – precipe per la sovjeta iniciato – sed la fantomo de internacia konflikto ankoraŭ ne estas forpelita, daŭre ŝarĝas la homojn inkubo de minacanta atoma tempesto.

Ĝuste en tiu momento, kiam la popoloj ekspiris malŝarĝe pro la unuaj videblaj signoj de pli konfidaj kontaktiĝoj inter la orienta kaj okcidenta tendaroj, ĝuste kiam leviĝas brilanta stelo de maltensio sur la nigra politika firmamento intrigas certaj kapitalistaj rondoj en Usono kaj Okc. Germanio kontraŭ ĉesigo de la „malvarma“ milito kaj celas ĝin ŝanĝi en varmegan. Pri tio atestas armado de neniam antaŭe atingitaj ciferoj. Ankaŭ ne eblas paroli pri inklino kontribui al interkompreniĝo kaj maltensio, kiam reakciaj parlamentanoj en Okc. Germanio decidas leĝon pri soldata servdevo kontraŭ la volo de la germana popolo. Ne montriĝas bona volo, kiam oni rifuzas aŭ malatentas ĉiujn proponojn koncerne paceman unuiĝon de ambaŭ germanaj ŝtatpartoj prezentitajn de la DDR-registaro. Okcid. germana kanceliero eĉ parolas oficiale pri „liberigo de la sovjeta zono“! Li propagandas ankoraŭ kun maljunuleca necedemo la „politikon de forteco“ kvazaŭ estus nenio ŝanĝiĝinta en la mondo. Li motivas sian stultan sed agresan politikon per la malnova, jam ridinda mensogo pri „Danĝero el la Oriento“.

Por ke la homaro trankviliĝu, la ŝtataj aŭtoritatoj fine devas – senecese sub premo de pacamaj popolamasoj – trovi ireblan vojon por senprokrasta kaj rapida solvo de la malarmada problemo. Ĉu la sovjeta ĉefdelegito ĉe la malarmada komiso en New York ne faris okpunktan proponon, adaptigitan plejeble proksime al tiuj de la okcidentaj potencoj? Ĉu ili ne povus servi kiel intertrakta bazo? Aŭ la okcidentaj diplomatoj denove malebliĝos ĉiun pozitivan rezulton per sensencaj, neakcepteblaj postuloj al Sovjet-Unio kaj la Popoldemokratioj, aŭ ili neos siajn proprajn proponojn?

El la supre dirita rezultiĝas ke ni ripetfoje, nelaciĝante devas postuli rigoran malpermeson de ĉiuj A-kaj H-armiloj kaj ĉiun eksperimentadon per ili, krome efikan reduktion de la armeaj fortoj. Nur tiel ni atingos staton, en kiu la paco venkos la militon. Plie ni devas konvinkigi la ankoraŭ indiferentan „homaron de la strato“, ke milito ne estas natura sorto, sed por la profitintereso (aŭ antaŭsentante sian historian pereon) celata kaj organizata de nur kelkaj ekonomie potencaj monopolistoj. Ni devas instrui la „homon de la strato“, ke li povas atingi la potencon malebligi ĉi katastrofon, se li persiste organizas la pacon.

Insiste ni ankaŭ devas alvoki la konsciencon de sciencaj aŭtoritatuloj. Ĉiu el ili devas apliki sian eminentan povon, influon kaj scion, ke la fruktoj de ilia esplorklaboro ne servu al blinda frenezaĵo, sed al plibonigo kaj pliriĉigo de la tuta homa socio. Per popularsciencaj artikoloj ili povus – pli multe ol ĝis nun – klarigi la duflankan aspekton de la homara evoluo rezultiĝanta el la atomtekniko. Ne nur je la ŝtataj aŭtoritatoj, ankaŭ je la sciencistaro kuŝas peza respondeco savi la homaron.

Kia patrino ne zorgus pri la estonto de sia dorlotito, legante la noticon de la angla gazeto „Manchester Guardian“ de la 28. febr. 1956, ke sole Usono posedas provizon de nuklea reakciiga materialo, kiu sufiĉus por produkti 32.500 atombombojn. Tiu ĉi nombro malfermus kruelan perspektivon, se .....

Manfred von Ardenne, konata germana fizikisto en DDR, skribis inter alie: „Kun plena verŝajneco eĉ nuntempe sufiĉus la tutmonda provizo de nuklea reakciiga materialo por detruigi ĉiujn grandurbojn

kaj la plimultnon da mezgrandaj urboj sur la terglobo. Ĉe supozita mezgranda bombo (ekz. kun ekvivalenteco de unu miliono da tunoj de la „Standart TNT-eksplozigaĵo“)/+/ oni atendas sur cirkla areo de 8 km-a diametro totalan detruon de ĉiuj konstruaĵoj. La limo de malpli gravaj konstruaĵ-domaĝoj ampleksas cirklarean diametron de 18 km.

La energi-ekvivalentoj de nuntempaj atombomboj ampleksas ĉirkaŭ 0.04 ĝis 0.5 milionoj de tunoj da TNT kaj nuntempaj tipoj de hidrogen-bomboj ampleksas ĉirkaŭ 0.5 ĝis 3 milionoj de tunoj da TNT.

Laŭ deklaro de ĉi sciencisto respondas la nuklea reakciiga materialo por 50.000 atombomboj nuntempaj (ĉiu ekvivalente al ĉirkaŭ 1 miliono de tunoj da TNT) al 5 miliardoj de pura karbo. Tiu ĉi kvanto egalas ses oblan karbo elŝaktigon de Usono, Sovjet-Unio kaj Anglio en la j.1954. Ne necesas multe da sagaco por ekkoni, ke tiuj provizoj de energio malfermus al la homaro helan, neimageblan estonton, se tiuj gigantaj amasigitaj energioj servus al la progreso kaj florado de ĉiuj popoloj.

Laŭ tiu ekkono ni pli ol antaŭe streĉu niajn fortojn por ke ni plenumu la gravan taskon: batalakiri la Pacon!

Willy GÖTZE  
ALTENBURG Bez.Leipzig DDR  
Zwikaŭerstr.31

/+/ TNT = Trinitrotoluol /Trotilo/

### ŜIRMADO KONTRAŬ ATOM-BOMBOJ

Jen respondo al artikolo de d-ro V. Ĥepka el Ĉeĥoslovakio, kiun ni siatempe sub sama titolo publikigis en PACO:

„En la ĉeĥosl.eldono de „PACO“ n-o.29-30 mi legis artikolon sub titolo „Ŝirmado kontraŭ atomarmiloj“, kiu estis precipe interesa por mi. Min ĝojas, ke la artikolo aperis en PACO kaj vekis atenton de multaj pacamikoj pri la atombombo. Sed bedaŭrinde kun ĝia enhavo mi ne konsentas.

Unue al mi ŝajnas, ke la raporto ne baziĝas je faktoj. Ekz. d-ro V. Ĥepka skribas „En aŭgusto 1945 eksplodis la unua atombombo super Hiroŝima, kie pereis 70 000 .....“ Sed laŭ oficiala japana statistiko, publikigita de hiroŝima urb-administranto, mortintoj en Hiroŝima kaŭze de la atombombatako nombras pli ol 240.000. Eble la aŭtoro studas nur publikaĵojn de la usona armeo, kiu intencas malpliigi la riproĉon de la mondo pri tiu ĉi afero. Mi esperas, ke PACO publikigu veran fakton pri la atombombo.

Due, kaj tio estas grava, li skribas „... sed kontraŭ la atombombo ekzistas ebleco ŝirmi .....“ Ĉu ĝi prava? Kiel k-do. V. Ĥepka skribis „... ne estas kaŭzo por paniko. La usona atomdiplomatia kaj atom-sociologio celas timigi la mondon, .... ni ne bezonas timi Usonon kaj aliajn ŝtatojn, kiuj havas atom-armilojn, ĉar la mondo ne permesas ili uzon, sed por realigi tion, la popoloj de la mondo devas persiste batali kontraŭ la posedantoj de atomarmiloj.

K-do.d-ro.Ĥepka skribis „... dum normalaj cirkostancoj tiutempe, la nombro de viktimoj estus malatigita almenaŭ je unu dekono.“ Sed kio estas normala? La cirkostanco ke tiam ne estis alarmo, multigis la viktimojn. Tio estis vere bedaŭrinda afero, grava fiasko de la gardistoj. En la antaŭa nokto aeratako daŭris la tutan nokton kaj matene 3 usonaj aviadiloj venis kaj du el ili forflugis. Tial gardisto erare juĝis, ke la atako jam finis kaj anoncis ekŝiĝon de la alarmo. Tiam eksplodis la atombombo kaj tio muligis la viktimojn. En tiu tempo la japana aerarmeo pereis kaj usona aviadilo preskaŭ ĉiam restis super Japanio. Tial oni daŭrigis ĉiutagan laboron, se nur unu aŭ 2 usonaj aviadiloj troviĝis en iu distrikto.

D-ro. V. Ĥepka skribis: „En 1945 la atomatako kontraŭ ne ŝirmitaj japanaj „ligno-urboj“ estis surpriza .....“ Ĉi priskribo estas parte prava, parte ne ĝusta. Sed plej interesa estas, ke li skribas nur pri la bombo de 1945 kaj tute ne mencias, ke la nuna bombo estas multe pli efika ol la lasta. En 1945 la atombombo kaŭzis grandan domaĝon al lignourbo, sed la nuna povas doni grandan domaĝon

al ferbetonaj konstruaĵoj. Usona hidrogenbombo eksplodigita en pacifika insulo, vaporigis la tutan insulon kaj nun post ĝi restis profunda maro. Se tia bombo eksplodus (tio ne devas okazi) super Praha, tie restus nur profunda kavo, kelkkilometrojn larĝa kaj kelkmetrojn profunda. Ĉu urbano de Praha povus sin ŝirmi kontraŭ tia eksplodo?

Komprenoble tia detruo estas limigita nur al malvasta areo. Eblas eviti domaĝon, se oni rifuĝas en malproksiman arbaron, sed oni ne povas eviti malsaniĝon pro radioaktiva elemento. En la kurjaro denove ankoraŭ ĉ.10 personoj mortis pro atommalsano. Ili spertis la atombombon en relative malproksima loko, aŭ vizitis la urbon ĝis post la eksplodo. Se la nuna forta hidrogenbombo kovrita per kobalto estos eksplodigita super Praha, la tuta Eŭropo estos plena da radioaktivaj Co 60 kaj aliaj elementoj, kaj dum longa tempo mortados multaj homoj pro atom-malsano. Se kelkcentoj da tiaj radioaktivaj bomboj eksplodos en Usono kaj Sovjetio, nia terglobo estos kovrita de radioaktivaj elementoj kaj estas duba, ĉu la homaro povos daŭrigi sian ekziston.

Japana esplorŝipo Ŝunkocu-maru revenis en junio de sia monata vojaĝo en Pacifika Oceano, kie nun usona armeo eksperimentas atombombon. Nun la materialoj estas precize esplorataj. Sed estas jam klare, ke radioaktiva akvo disvastiĝas al 2.000 km okcidenten de la eksplodejo kaj proksimiĝas al Japanio. La danĝera akvo estas portata de Kuro-ŝio (Nigra Marfluo). La usona registaro decidis danĝeran sferon, sed la maro ne obeas. La danĝera akvo transpasas la limon. Tio signifas, ke la danĝero estas pli granda ol usona sciencisto antaŭsupozis.

Same okazigis ĉe la eksplodo en Bikini. Radioaktiva cindro mortigis pacan fiŝiston, naĝintan ekster la de usona registaro markigita danĝerlimo. Necesas noti, ke la efektiva danĝero ĉiam estas granda ol la antaŭsupozo de sciencistoj.

Unuvorte mi opinias, ke via artikolo baziĝas je la domaĝoj de la atombombo el 1945, dume la nuntempa bombo estast miloble pli forta kaj danĝera. Mi esperas, ke vi nun profunde studu la nunan hidrogenbombon kaj la rezulton bonvolu publikigi en „PACO“.

HUKUNAGA-Isao

Macuzaki, Ogoor-maĉi, Mii-gun

HUKUOKA-KEN, Japanio

### MODELA MEM-SEKCIO EN VIETNAMO

La Hanoi-gazeto „VAN-NGHĤ“ (Literaturo kaj arbo) publikigis en n-o.122. de 31/5.56. raporton pri la disvatiĝo de Esperanto en la Popoldemokratioj kaj speciale menciis esp-eldonon de „Sinjoro Tadeo“ de Mickiewicz en Polio.

La ĵurnalo THOI-Moi (Nova Tempo) publikigis la 25.5.56 artikolon pri interŝanĝo de infan-desegnaĵoj okaze de la Internacia Tago de Infanoj (1.6.) kun adresoj de MEM-perantoj.

Dank` al la MEM-tradukservo, du gravaj vietnamaj liceoj en Hanoi kontaktiĝis kun lernejoj de pluraj landoj. La geliceanoj proprasperte rekonas la utilecon de Esperanto kaj eklernas ĝin. Rondo de memlernantoj funkcias ĉe knabina liceo Nguiyen-TRAI. Ĝia adreso: Esperanto-rondo ĉe Liceo Nguiyen-TRAI, HANOI, Vietnam.

Per nia helpo kvin vietnamaj mezgradaj lernejoj partoprenis sport-konkurson okaze de la Internacia Infantago, proponita de la mezlernejo „Klement GOTTWALD“ en Dolní Bludovice (Ĉeĥoslovakio). Tiu navaĵo estis publikigita en la gazetoj de Hanoi. Vietnamaj lernejoj ekinteresiĝis pri la utileco de Esperanto por la internacia kunligado. La adreso de la MEM-sekcio estas: Esperanto-rondo 4 Ly Thuong-Kiŝt, HANOI, Vietnamo.

La landoj kie la poŝto ne akceptas sendaĵojn por Vietnamo vi povas uzi peranton: K-do.R.BURDA Palackého nám.6, PLZEŇ, Ĉeĥoslov. Ĉar k-do.Burda ne disponas monon por afranki viajn sendaĵojn al ni, necesas aldoni Int.resp.kuponon laŭ pezo de via sendaĵo.

Vietnama MEM-sekcio

N.V.Kinh

## LA JURO DE LA PACO

La principo de paca kunekzistado estas konfirmita en komuna proklamo de Hindio kaj Ĉinio (28.6.1954) en dokumentoj de la Bandug-konferenco 1955, de sovjeta-jugoslavia deklaro (2.6.1955) kaj en komuna deklaro de Bulganin kaj Nehru (2.6.1955).

La principoj de paco kunvivado ankaŭ estas konfirmita en komunaj deklaroj de ŝtatestroj de Sov. Unio, Hindio, Burmio kaj Afganio. Krom tio ili estas starigitaj en sovjeta-norvega, sovjeta-sveda, sovjeta-angla kaj sovjeta-franca deklaroj kaj dokumentoj.

N.T.

## INTERNACIA INFANTENDARO PORPACA

En Frostavallen, situanta inter lagoj kaj arbaroj meze de suda provinco de Svedio okaziĝis dum julio internacia infantendaro kun 30 partoprenintoj el diversaj landoj, i.a. el Britio, Ĉeĥoslovakio, Egiptio, Germanio, Hindio, Skandinavio, Sovjetio kaj Usono.

Unu el la honorgastoj estis la inicianto de tiaspeca infantendaro, profesorino Doris Allen, Cincinnati, kie la unua infantendaro okaziĝis en 1951 (Ĝis nun okaziĝis 14 tiaj renkontiĝoj). Ŝi diris, ke ŝi ricevis la ideon de sia filo, kiu foje maltrankvile demandis: „Ĉu efektive okazos nova milito?“ Mi respondis, ke ni devas kiel eble plej bone labori por malhelpi tion. Kaj poste mi prenis sur min la iniciaton de la organizo.

Ĝia celo estas paco sur la tero kaj la ideo estas, ke la pacpenso kaptos la infanojn, diris Allen plu. Per psikologiaj esploroj, ŝi diris, estas konstatite, ke 11 jaroj estas konvena aĝo por vekti ĉe la infanoj la intereson por paco kaj translima amikeco.

Kiel gasto ĉeestis ankaŭ franca verkisto Michel Boutron. Li ekkriis entuziasme: „Internaciaj infantendaroj estas vakcino kontraŭ milito!“ Li jam verkis libron pri la unua tendaro en Cincinnati, tradukita en plurajn lingvojn. Nun li planas skribi novan, pri siaj impresoj kaj spertoj el la tendaro en Frostavallen.

En ĵurnalo ni legis, ke la diverslandaj infanoj en Frostavallen venkis la lingvajn malfacilaĵojn por gestoj kaj mimikoj.

Nu, la aranĝantoj ankoraŭ ne atentis la internacian lingvon, kiel ne rimarkas distrita scienculo la okulvitrojn sur la propra nazo. Tial la infanoj devas egali al surdmutuloj. Kiel longe ankoraŭ daŭrigos ĉi stranga stato?

Se la demokratio vere volas favorigi solidarecon kaj transliman amikecon, ĝi devas senprokraste en ĉiuj lernejoj de la mondo enkonduki la jam elprovan ilon de interkompreniĝo kaj paco – Esperanton.

Skaniano

## LA BULGARA REGISTARO KONTRIBUAS POR ESPERANTO

Laŭ raporto de „BULTENO“, organo de la Bulgara Esperanto Asocio la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio havas pozitivan rilaton al Esperanto. La Bulgara Landa Packoitato disponigis al la Esp-Asocio subvencion de 30.000 levoj, egalvaloraj al 4.412 uson.dolaroj aŭ 1.300.000 francaj frankoj.

O.Moiseev:

ATENTU : KOLOMBOJ !

Antaŭ nelonge en Moskvo sur la Petro-stratoj, kie sur pavimoj promenadas amasoj da kolomboj, estas elpendigita neniam kaj nenie ĝis nun vidita trafik-signo: En flava cirklo kun nigra triangulo estas pentritaj du blankaj kolomboj. Ĝi avertas la maŝinkon-dukistojn: „ATENTU ! KOLOMBOJ !“ Veturado en ĉi sektoro estas permesata ne plirapida ol 5 km hore.

La historio de la nova trafiksigno estas jena:

Foje lernanto de la 170a lernejo el Sverdlovsk-distrikto de Moskvo, Georgĝjo Vajnŝtejn vidis kiel rapidege veturinta aŭtomobilo sur la strato premis kolombon. Georgĝjo prenis la birdon hejmen kaj flege resanigis ĝin. Poste la knabo sendis leteron al la redakcio de „PIONERSKAJA PRAVDA“ (Pionira Vero):

7 –

„Mi tre amas kolombojn“ li skribis. „Ili ne nur estas belaj birdoj, sed ankaŭ simbolo de paco. Sed iuj ŝoforoj veturas ne atenteme kaj premas ilin. Bonvolu ordoni al la maŝinkondukistoj obei atentemon en tiuj lokoj, kie estas multaj kolomboj. Ni, pioniroj, estos tre dankema al vi.“

La redakcio sendis la leteron de la pioniro al la oficejo pri reguligo de la strat-trafiko. Pasis iom da tempo kaj sur la stratoj de la ĉefurbo aperis nova trafiksigno. Tiaj signoj ne ekzistas en iu ajn alia lando de la mondo.

El ruslingva duonmonata revuo „SMENA“ n-o.11. de junio 1956

Tradukis: A.SIDOROV-Krjukovo

Sovjet-Unio

### MOVADO DE BONFARO

En Japanio oni nun komencas movadon por kolekti monon kaj aliajn aĵojn por savi postvivantajn viktimojn de la atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki.

La viktimoj pro malbona sanstato, fare de keloidoj ne povas sufiĉe labori. Tial iliaj enspezoj malmultiĝas aŭ nuliĝas kaj ili devas vivi mizere. Memkompreneble estas por ili malfacile ricevi ian kuracadon.

La 7. de julio mortis 24jara virino. Ŝi estis la dekunua viktimo ĉi jare pro la atombombo super Hiroŝima en 1945.

Hiroŝi HARUTA

Owase-si-Japanio

### SVEDA ESP-TURISTO EN SOVJETIO

Nia abonanto, Erik EKSTRÖM el Göteborg, vizitis dum kelkaj tagoj Leningradon kaj Moskvon. Pri siaj spertoj li rakontas:

Tuj ĉe la alveno en Leningrad mi trovis kontakton kun tieaj esperantistoj, kiuj diversmaniere kontribuis al la interesa restado. Jam la unuan vesperon ili min invitis al la tre solena vespero en la pompa Kirov-teatro. Ĉe nia forvojaĝo al Moskvo pluraj esperantistoj kolektiĝis en la fervojstacio kio tre imponis ne nur al mi, sed al la tuta turista grupo, al kiu mi apartenis. Oni miregis pri la facila interkomprenigo inter ni, unuafoje renkontiĝantaj.

Ankaŭ en Moskvo sekvis bona akcepto. Tie mia Esp-kontakto ebligis al mi kaj du grupanoj viziti laboristan hejmen, kaj en ties tipe rusa kaj ege amikeca atmosfero ni pasigis kelkajn horojn, trinkante teon kaj babilante.

Ĉe la forvojaĝo el Moskvo unu el tiuj, kiuj partoprenis la viziton, deklaris antaŭ la grupo:

„Mi scias kvar okcidentajn mondlingvojn kaj ankaŭ la rusan mi lernis dum du jaroj en Stockholma Altlernejo, sed ĉi-vespere ni estis venkita per Esperanto, kiu montriĝis esti la vera rimedo por krei kontakton inter homoj diversnaciaj.“

Plurfoje la 42-persona turista grupo esprimis kiel sian opinion, ke devus svarmi esperantistoj en la vizitataj urboj. Sed mi avertis pri tia falsa supozo, ĉar ankoraŭ certe ne dominas aŭ imponas per sia multnombro, sed des pli per sia kvalito. Ĉiuokaze oni estis tre surprizita pri mia facila interrilatebleco, dume oni mem estis sklave ligita al la gvidantoj de la grupo.

## ĈIUJ ESTAS RESPONDECAJ !

Sovjetuniaj esperantistoj serioze klopodas, ke ĉe la granda internacia junular-renkonto okaze la Festivalo – 1957 en Moskvo oni uzu ankaŭ Esperanton kaj okazigu Esperantistan Junular-tendaron.

Junular-Ensemblo de plejgranda leningrada kulturdomo jam dissendis tiusenkan alvokon en Esperanto al la tuta mondo. Por la movado en Sovjetio kaj najbaraj landoj, sed ankaŭ por la tutmonda movado estas gravega, ke tiu projekto sukcesu kaj pruvu la utilecon de nia lingvo. Kiel jam okazis en Varsovio, la Federacio de la Tutmonda Dem.Junularo (centro en Budapest-VI, Benzur-u.34) akceptis aranĝon kaj eĉ en siaj kelk-lingvaj gazet-eldonoj pretas uzi Esperanton. Do, necesas streĉi la fortojn, ke anstataŭ fiasko aŭ mizera sukceso, estu grandnombra partopreno el ĉiuj mondpartoj.



Necesas serĉi en ĉiu loko kontakton kun la junular-organizoj, grupoj kaj unuopaj personoj, interesigi ilin pri tiu aranĝo, proponi kursojn kaj instigi ilin al lernado. Junuloj, kiuj jam scias Esperanton provu sin anonci kaj partopreni la Festivalon! El multaj lokoj oni preparas kolektivajn vojaĝojn kun minimumaj kostoj, sed kelklande eĉ senpagan. Do la agado inter la junularo-tion grava por nia movado- estu nun unu el niaj ĉefaj agadkampoj por 1956-57! Ni ĉiuj je estas respondecaj!  
Pál BALKÁNYI

BUDAPESTO

### DISTINGAĴOJ EN KRIMA MILITO NE ESTAS „HONOR-INSIGNOJ“

La konsilantaro de la „PAX CHRIST-MOVADO“ en Germanio konstatas, ke per voĉdono por la leĝo pri ordenoj en la germana parlamento, oni premias praktike la teruran kruelecon dum la dua mondmilito. Ĉi konstanton enhavas akra protestskribo, sendita al ĉiuj deputitoj de tiu parlamento.

Konsentite de la episkopo de Eichstätt, d-ro. Schröffer, la germ. „Pax Christi Movado“ provokas la deputitojn malakcepti la leĝon kaj rezigni pri la revalidigo de promilitaj distingajtoj. Ĝin agigis la konvinko, ke la dua mondmilito estis eksplodigita kun intenca arogeco, kiu sekvigis milionfojan kaj = oblan krimon. Ankaŭ la persona plej bona intenco de servado al popolo kaj patrujo ne povas pravigi, se la memorinsignoj de la krimintence ekigita milito estus deklaritaj kiel „honorinsignoj“. Oni ankaŭ ne povas pretervidi, en kies nomo ĉi-ĉiuj distingiloj estis donitaj. Ĉi makuloj ne eblas forigi! La Pax Christi Movado konsideras, la rezignon pri revalidigo de la militinsignoj unika ŝanco de Germanoj, antaŭ la mondo dokumenti ankaŭ la rezignon pri ĉiu malvera naciismo.

Ĉu la samo ne validas ankaŭ pri ĉiuj ceteraj nacioj, kiuj per nehomaj metodoj subjugas fremdajn, nesufiĉe evoluantajn popolojn kaj ripetas la Nürnberg kondamnitajn diablojn? Necesus nova mondtribunalo kontraŭ edukistoj, instruistoj, oficiroj kaj politikistoj kulpaj pri tiuj hontigoj de ilij patrujoj!

D-ro.A.HALBEDL  
KNITTELFELD-Aŭstr.

### VIETNAMO SUBTENAS ALĜERION

Konferenco de Vietnamaj Patro-landa Fronto kaj Vietnamaj Mondpacdefenda Komitato kunveninta en Hanoi la 7-8. de junio 1956, aŭskultinta raporton pri la situacio en Alĝerio, unuanime konstatis jenon:

La batalo de la alĝeria popolo estas legitima batalo por nacia liberiĝo. Francoj koloniigistoj, kontraŭ volo de la franca popolo, disvastigas kolonian militon kaj redaŭrigas la krimojn okazigitajn kontraŭ la Hindaĉina popolo.

La legitima batalo de la alĝeria popolo nekonatiĝas kun simpatioj de ĉiuj pacamaj popoloj de la mondo.

La franca popolo kaj ĝiaj eminentuloj severe kondamnas la kolonian militon en Alĝerio.

Araboj, asiaj kaj afrikaj popoloj obeante la historian konferencon de Bandung (1955) kontraŭ la koloniismo, energie protestis kontraŭ la milito en Alĝerio.

Lastatempe sinjoro Nehru, ĉefprezidanto de la Hinda Federacia Respubliko, proponis en 5 artikoloj solvon de la alĝeria problemo. Ĝi trovis la aprobon de la monda opinio. La vietnama popolo ĝin ankaŭ subtenas.

Dum la internacia situacio malstreĉiĝas, la milito en Alĝerio pli furiozas kaj kaŭzas ĉiaspecan damaĝon al la franca kaj alĝeria popoloj. La vietnama popolo estas amiko de la alĝeria popolo, de la koloniaj dependaj popoloj, same kiel de la franca popolo – pacamanta, kontraŭkolonista popolo. Ĝi batalas por la mondopaco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj. La vietnama popolo, kiu suferis 9jaran militon kontraŭ la koloniismo tre simpatis kun la alĝeria popolo kaj streĉe observas ĝian liberigan batalon.

Kun kun la franca popolo, la pacamantaj popoloj de la tuta mondo kaj la vietnama popolo postulas eble plej baldaŭan milit-ĉeson en Alĝerio!

La historio montris, ke neniu forto kapablas venki unuigitan popolon, kiu leviĝas kontraŭ invado, batalante por sia nacia liberiĝo, estante subtenanta de ĉiuj popoloj. La politiko de „armita forto“ jam bankrotiĝis sur la internacia areno. Ĉiu internacia konflikto estu nepre solvita surbaze de pacaj interkonsentoj. Tial la francaj koloniistoj, se ili daŭrigos la malpravan armitan politikon en Alĝerio, estos venkitaj.

La vietnama popolo opinias, ke la franca registaro, uzinta pacan interkonsenton por celtrafe solvi la problemojn de Maroko, Tunizio, devas fari same koncerne Alĝerion. La franca registaro nepre interkonsiliĝu kun la veraj reprezentantoj de la batalanta alĝera popolo sur la bazo de rekono de ĝiaj naciaj rajtoj. Tio estas unusola solvo en la intereso de Alĝerio kaj Francio, kaj ankaŭ favora al la mondpaco.

Tradukis Vietnamana MEM - sekcio

### „NATO“ POR AFRIKO

Preskaŭ tuta afriko estas okupita de fremdaj nacioj. Grandbritio kaj Francio tie posedas siajn plej grandajn koloniojn .... Sed ankaŭ Portugalio, Hispanio kaj Belgio havas koloniojn tie. Sed kiom longe! Super la tuta kontinento leviĝas la movado de la popoloj por libereco kaj sendependeco. Tio timigas koloniigistojn kaj tial ili planas laŭ „UNITED PRESS“ (11.7.) krei „NATO“n por la defendo de Afriko.

Oni facile povas ekkoni la motivon.

N.T.

### BLANKULA VENĜAVIDO

Oni asertas, ke Winston Churchill vizitante Kenion estus dirinta:

„Afriko malgraŭ ĉio tamen apartenu al Afrikanoj“.

Sed – sed „Pafu 100 Negrojn por ĉiu blankulo!“ kriis la eŭropaj farmistoj, kiam la Maŭ-Maŭ-anoj ribelis por ricevi la ŝtelitan teron. Efektive 10.000 Negroj estis mortigitaj, t.e. 300 por ĉiu blankulo. Kaj 50.000 *Kikuius*-Negroj daŭre estas enkarcerigitaj.

b.

### ILUSTRAĴO EL BELGA KONGO

Kuracista misiisto Titus Johnson el Ĉikago, kiu deĵoris en Belga Kongolando, faris jenan eldiron pri la tiea situacio:

„Bedaŭrinde la plej malbonaj flankoj de la civilizacio havas altiran forton je ĉi nekomplikitajn infanojn de la naturo. Ili iĝis nefidindaj kaj malhonestaj.

Drinkemo floras kaj ĉirkaŭ 75 procentoj estas infektitaj de veneraj malsanoj (seksmalsanoj).“

La demando estas: kiu vivmaniero estas la plej konvena por la malsimilaj homgrupoj? Eĉ se la okcidenta kulturo estas la plej bona por la blankkrasulo, tio tamen ne signifas, ke la kongolandaj Negroj povas esti formataj laŭ la sama modelo.

La emo de blankkrasuloj, devigi la Negrojn akcepti ilian civilizon ofte donis abomenajn sekvojn. La malnova germana Afriko-konato, von Laschau esprimis la aferon tiel:

„En Afriko ne troviĝas aliaj sovaĝuloj ol blankuloj, kiuj igis frenezaj!“

Ergo

### TIEL VIVAS LA MUZULMANOJ!

La oficiala franca statistiko ne povas kaŝi la teruran socialan staton en la Nord-Afriko.

Tiu, kiu per propraj okuloj vidis la mizeron kaj la subpremadion tie, sed ankaŭ la batalemon k. solidarecon inter la amasoj, neniam forgesos tion.

Grupoj da orfaj infanoj vagas tra la stratoj, esperante trovi ion manĝeblan, infanoj kun malsanaj okuloj kaj malgrasaj korpoj kun ŝvelintaj ventroj, ĉar ilia „manĝaĵo“ plurfoje nur ekzistas el akvo densigita per argilo. Infanoj, kiujn oni vidas dum la noktoj dormantajn laŭlonge de la dommuroj, gefratoj, kiuj kuŝas kun interplektitaj brakoj unu apud la alian.

Flanke ĉe la blankrilantaj eŭropaj partoj en grandaj urboj ĉe la marbordoj, kuŝas la aglomeraĵo de arabaj kvartaloj „Les bidonvilles“, kie la plej malriĉaj loĝas. En domoj el ondumita lado.

-10 -

Pri higieno oni ne povas paroli. La mortado de infanetoj estas 181 je mil Muzulmanoj. La franca koloni-administracio pligrandigis la analfabetismon, kiu nun ampleksas 80-90 % de la loĝantaro. Samtempe ĉiu ajn popolkleriga movado estas malpermesita. Studrondoj funkcias kontraŭlege kaj tiu, kiu skribis ĉi liniojn, vizitis tian studrondon.

Nils LALANDER

### EPISKOPO EL FILMFESTIVALO

Dum daŭro de Internacia Filmfestivalo en Karlovy Vary (ĈSR) okazas en regionaj urboj paralelaj t.n. Porlaborulaj Filmfestoj. Tiujn ĉi festojn ankaŭ partoprenas internaciaj delegitoj. La subskribinto estis delegita por la regiona sindikata movado, kiu salutis kaj akompanis delegitaron de Germana Demokr. Respubliko okaze de prezentado de filmo „Ernst Thälmann, la gvidanto de sia klaso“. Per ĉi linioj volas nur demonstrii kiel ne nur malfacila, sed precipe malagrabra estas la situacio kiam oni ne komprenas unu la alian.

La renkonton partoprenis krom la tri gastoj ok ĉeĥaj reprezentantoj kaj devis zorgi pri la parola kontakto. Ĝi okazis en urbo Liberec kaj la rezulto estis nekontenteco de ĉiu partoprenantoj, kvankam oni ĝin ne esprimis.

Se okazis ankaŭ io, kio frapo montris la ekziston de internacia lingvo: Dum solena akcepto en la urbodomo, kiam denove neniu el tiuj urbaj reprezentantoj scipovis la germanan lingvon, interesiĝis f-ino Franz pri mia insigno kaj demandis pri ĝia signifo. La respondo, antaŭ ĉies atentemo nur estis: „la internacia lingvo Esperanto“. Subite vekiĝis granda intereso ĉe filmaktoro Franz kaj li tuj demandis Esp-lingve: Ho, ĉu vi parolas Esp-on, amiko?

Bedaŭrinde tio estas ĉio, kio restis ankoraŭ en lia memoro el la lernotempo, sed eĉ tio sufiĉis montri al areto da homoj, kiuj estis devigitaj pro ilia nescio silenti, ke la internacia lingvo, post mia klarigo, ĉiam ankoraŭ vivas kaj eĉ grave progresas. Aktoro Franz estis interesita pri la nuna stato de la lingvo kaj mia movado kaj intencas denove alproprigi al si ĝian scion. Tial rekomendas al niaj germanaj gek-doj kontakti kun Erich Franz kaj varbi lin al baldaŭa kunlaboro. Li aktoras ĉe la Germana Teatro, direktita de Bert. Brecht kaj por la filmkompanio DEFA en Berlino, DDR.

Ĉiu paŝo antaŭen – ĉiam sukceso por nia afero!

Sláva PYTLOUN  
Liberec-Ĉeĥoslov.

### SOVETIO PRENIS INICIATIVON

La Supera Sovet de Sov.Unio turnis sin al ĉiulandaj parlamentanoj kun apelo proponante, ke ili ekzameni kaj subtenu la iniciaton de Sovetunio pri redukto de la armitaj fortoj kaj siavice faru finon al la armado, reduktu la armitajn fortojn kaj la armaĵojn kaj per tio inde kontribuu al la fortigo de la paco inter la popoloj.

La supera Soveto respondis al al japana parlamento i.a., ke ĝi opinias, ke nur plena malpermeso de A- kaj H-armiloj povas liberigi la popolojn de la minacanta neniigita atommilito.

Jam la 10.de majo Sovetunio proponis al ŝtatoj, kiuj posedas A- kaj H-armilojn ĉesi la eksperimentadon kun ili.

Bedaŭrinde la propono ĝis nun ne estis akceptita. Sed tio ne malhepas Sovetunion daŭrigi la

batalon por plena malpermeso de atomarmiloj kaj senprokraste ĉesigo de eksperimentoj kun termonukleaj armiloj.

N.T.

### MIL PAPERGRUOJ

Nun sorĉo por resaniĝo aperas inter la atom-malsanuloj en Japanio:

Oni diras, ke se la malsanulo sukcesas fari mil papergruojn, li povas resanigi. Kaj la malsanuloj provas fari mil papergruojn kun la forta deziro resanigi.

Papergruoj, faldfaritaj de la malsanulo mem, multiĝas de tago al tago super lia malsan-lito. Ĉiu papergruo simbolas prego al la vivo. Kiu kapablas forridi la aferon kiel *superstiĉon*, rigardante la diverskolorajn papergruojn? Ĉar kuracmetodo alia ankoraŭ ne ekzistas, oni koncentriĝas sian esperon je tio.

H.HARUTA

-11 -

### KULTURA EKSKURSO KUN MEM TRA L'MONDO

ALBANO: En la jaro 1945 80% de la loĝantaro povis nek legi nek skribi. La analfabetismo estas nun likvidita inter la aĝoj 10-40 jaroj.

MONGOLA POPOLRESPUBLIKO: La analfabetismo estas entute forigita. La lando havas grandan nombron da elementoj kaj mezaj lernejoj. Troviĝas tie ankaŭ altlernejoj kaj ŝtata universitato Tjoibalsan.

NORDOKOREIO: En la respubliko troviĝas nun 16 altlernejoj. Centoj da lernejoj, klubdomoj, kinejoj, hospitaloj, infanvartejoj kaj aliaj utilaj institutoj estas rekonstruitaj.

POLIO: La altranga vorko de B.Prus „LA FARAONO“, en Esperanto-traduko de Kabe, estas nun presata.

SOVJET-UNIO: Laŭ raporto de TASS aperis pasintjare en S.U. 7.240 ĉiutagaj gazetoj en eldokvanto de pli ol 48milionoj ekzepleroj.

En Moskvo estis eldonita ampleksa antologio de germana demokrata poezio el la jaroj 1914-1953 en rusa lingvo.

Moskvoeldonejo intencas, laŭ „LITERATURNAJA GAZETA“, eldoni plurajn verkojn el la sveda literaturo en rusa lingvo. Unue aperos jubilea eldono de verkoj de la poeto Tegnér kaj poste vico da modernaj verkistoj *l.a.* Moa Martinsson, Josef *Kallgren* kaj Peter Matthis.

KOMPAROJ: Sovjet-Unio dum la lastaj 25 jaroj edukis 682.000 inĝenerojn. Usono dum sama tempo nur 480.000.

En la agrikulturo la ciferoj estas por Sovjet-Unio 244.000 specialistoj. Por Usono 133.000.

Finekzaminiĝis en Sovjet-Unio dum tiuj 25 jaroj 320.000 kuracistoj. En Usono dum la sama tempo 148.000.

STATISTIKO: En Norvegio troviĝas unu kuracisto por 940 homoj, en Danio unu por 950 kaj en Svedio unu kuracisto por 1.300 homoj.

Ĉiu Sviso skribas 242 leterojn jare. La Belgoj skribas preskaŭ same multajn. En Svedio la letterskribado sumiĝas 136 po jare je unu persono.

Kompilis: V-a

La gazeto „SOVJET-RUSLANDO“ publikis la 13.7.56 jenana artikolon:

### KORESPONDADO EN LINGVO ESP-O.

KUJBIŜEV, la 12.de julio. (Nia korespondanto) En la jaroj de la heroa batalo de la hispana popolo kontraŭ la faŝistoj laboris en la leningrada uzino „SVETLANA“ Vladimir Prokofjeviĉ kiel muntisto -provisto kaj gvidis tie rondeton de esperantistoj. Leteroj, kiujn tiu rondeto ricevadis el Hispanio,

Pisarev tradukis en rusan lingvon kaj uzina gazeto ilin publikigis.

Vladimir Prokofjeviĉ zorge konservas leteron de hispana Konsomol-ano, senditan el Madrido en la jaro 1936. Sur tiu ĉi letero troviĝas persona postskribo de konata hispana batalantino Dolores Ibarruri.

„Utiligante ĉi okazon mi sendas fratecan saluton.

Dolores Ibarruri“

La rondetanoj korespondadis kun francaj laboristoj, kun batalantoj de la ĉina popola armeo, kun esperantistoj el Svedio, Belgio, Danio, Nederlando, Britio.

En la jaro 1941 la korespondado interrompigis. Pisarev kiel volontulo iris al la fronto...

Post 5 jaroj ĉefleŭtananto Pisarev estis demobilizita kaj veturis al nova loĝloko Kujbiŝev. Ĉi tie li decidis denove komenci la korespondadon kun eksterlando. Vladimir Prokofjeviĉ sendis sian adreson al la „PACDEFENDANTO“, eldonita en Ĉeĥoslovakio. Lia adreso estis publikigita kaj al Kujbiŝev komencis alveni leteroj el Hungario, Vietnamio, Ĉeĥoslovakio, Polio, Ĉinio kaj aliaj landoj. Alvenis ankaŭ letero el Svedio de ĵurnalisto, kun kiu Pisarev korespondis longe antaŭ la milito.

Tradukis Grigorjev MOSKVO

SE AL VI PLAĈAS NIA GAZETO, REKOMENDU KAJ PRUNTU ĜIN AL ALIAJ  
ESPERANTISTOJ!

### BATO KONTRAŬ LA PACO

La okcidentgermana rearmado estas serioze bato kontraŭ la politiko de maltensio kaj senarmigo. La decido en Bonn (junio) ne estas konforma al la deziro de la germana popol-plimulto kaj ĝia volo al reunuiĝo kaj sekureco. Bonn same kiel Vaŝingtono fariĝis trabanto de la „fortopolitiko“ kaj glacie malakceptis ĉian provon de kompromiso.

Tial ĉiuj pac-anoj ĉie subtenu la publikan opinion de Okcc.Germanio kaj batalu kontraŭ la decidoj el Bonn.

Germana pacstrebanto

### 4.000 KRONOJN POR ESPERANTO

La sveda registaro asignis 4.000 sv.kronojn por la Internacia Kulturaranĝo en Svedio la 29/7-4/8. 1956.

La aranĝon partoprenis 2.100 esperantistoj el 15 landoj.

### LA PAX CHRISTI MOVADO ADOPTIS ESPERANTON

La katolika pacmovado „PAX CHRISTI“ oficiale adoptis por siaj celoj Esperanton kaj donis al ĝi la saman rolon kaj rangon kiel ĝuas „ĉefa lingvo“ en la administrado kaj kongresoj.

### LA INSTRUO DE STRASBURG

Jam dum flamado de nia entuziasmo pro la surpriza sukceso de nia afero ĉe UNESKO en Montevideo laŭtiĝis voĉoj, kiuj atentigis, ke tiuj decidoj fariĝis kvazaŭ per superruzo kaj anima premo al la pli multe malfavoraj delegitoj de la UNESKO-anaj ŝtatoj post la eĥo de ilia kontraŭa sinteno el la kompetenta komisiono en la vigla gazetaro de Montevideo. Kaj tiaj voĉoj de tiam praviĝis, kiel montras la sorto de Esperanto en Strasburg, kie kunvenis aliaj delegitoj rekonsciiĝintaj, ke la decidoj de UNESKO dubigis iliajn agrablajn kaj mongajnjajn privilegiojn.

Se la internaciaj kunvenoj dank` al Esperanto fariĝos simplaj, tempon kaj monon ŝparaj kaj eble eĉ solvos la problemojn, al ili konfiditajn, tiam la „belaj tagoj de Aranjuez“ estos por ili pasintaj. Kaj por laŭeble prokrastigi ĉi timatan fatalaĵon, ili nek koncedos al Esperanto tiun grandan taskon, nek mem lernos ĝin, ĉar ankaŭ la forluantoj de tradukaparatoj kaj diverslingvaj interpretistoj deziras plue ĝuadi la agrablan okupiĝadon pri malfacilaĵoj de la homaro dum la ĝiusnuna malsimpla, temporaba kaj multkostega procedado.

Tial nidevas bedaŭrante konstati, ke Esperanto kiel lingvo ankoraŭ ne estos venkinta se ĝi ne tuj komencos laŭte proklami sian vivelementon, la internan ideon kaj ne servos tiuj movadoj, kiuj neevitable ĝin bezonas.

Sed, jam Pax Christi, la katolika pacmovado adoptis Esperanton. Ekzistas ankoraŭ aliaj kiel ekz. la Internacia Ligo por Repacigo kaj la potenca Monda Packonsilantaro, kiu lasta laboras sur la tuta mondo. Ambaŭ tiuj organizoj preskaŭ ignoras Esperanton, kvankam pacdefendantoj jam plurfoje proponis al ties estraroj la akcepton de nia lingvo kiel samrajtan lingvon por la administrado kaj pritraktado de temoj, kiuj interesege la tutan homaron. Iliaj gvidantoj estas kontentaj, paroli antaŭ nekomprentantaj hoamasoj aŭ rondetoj sur la tuta tero kaj poste ŝajnmodeste raportoj pri siaj klopodoj, ja ne pri la agrablaĵoj de siaj rekomencitaj vojaĝoj ĉirkaŭ la tergloba. Kvankam laŭvorte kaj finance ili deziras atingi ĉiun homon de ĉiu nacio kiel membron de sia organizo, ili tamen ignoradas la unikan, por tiu celo destinitan lingvon – Esperanton. Ili paradas per procedadoj, kies antikveco apenaŭ estas mildigata per la multtekostaj telefonaj simultan-aparatoj. Iliaj koroj ne premis la reala fakto, ke la plej granda parto de la homaro, tiu, kiu pasigas sian vivon nur en peniga pan-akirado ne povas supreniri la ŝtupetaron de sufiĉa kleriĝo kaj atingi la scion de multlingveco

por rekte interrilati kun siaj kunhomoj el aliaj regionoj de la tero, kvankam ili tion arde dezirus.

Kaj tamen la paco, ido de l'amo, frato de l'idealismo, estas destininta al ĉiu homo de bona volo. Tiam, ĉiu homo bezonas la eblecon de la senpera interkompreniĝo kun homoj de aliaj nacioj.

-13 -

Tial la pacorganizoj konsciiĝu pri siaj devoj, adopti Esperanton por akceli la pacon kaj ni, esperantistoj amase enpenetru la pacmovadojn per niaj servoj kaj nia lingvo fariĝos nerezignebla!

Se ambaŭ movadoj daŭrigos eviti unu la alian, ili pekos kontraŭ la feliĉo de la homaro kaj neniam sukcesos devigi la aŭtoritatojn, respekti la kordeziron de la homaro nepre eviti militon, la lastan pravigrimedon de la tempoj pasintaj. Nur tiam tiuj ĉesos malŝpari sumegoj da impostoj, kiujn ankoraŭ nun englutas en la monsakoj de mortigil-produktantoj.

Jam preskaŭ antaŭ 2.000 jaroj granda profeto Jesuo Kristo instruis ne nur amon al samfamilianoj, sed eĉ al malamiko, samtempe ankaŭ por nia epoko li antaŭdiris, ke pereos per glavo, kiu uzas glavon.

Ni pruvu, ke la bedaŭrinda okazintaĵo de Ŝtrasburg estis nur konsekvenco de la nehaltigebla antaŭen iranta evoluo de la homaro!

D-ro. Adolf HALBEDL  
heplsekret. de MEM

### PRIPENSAĴO

Orig.verkis J. BURGER – Saarlando

Se kristanoj fakte estus  
bonaj homoj nun en vero,  
ne nur vorte, sed per fafoj,  
paradiz` la tero!

Sed se foje kristanece  
vivis homo per la faro  
pro la glor`de l`blanka korvo  
festas tuta kredularo!

Ĉu ni povas pace vivi  
nur sub Wittenberg` aŭ Romo?  
Certe ne, ĉar sen Biblio  
vivas brave kelka homo!

### KRIMULA LIBERO !

Mi loĝas en „libera“ lando!  
Honeste, restis mi proleto.  
Butikoj plenaj ĝis la rando,  
Nur mankas mono por aĉeto!

Sed – antaŭ, dum kaj post militoj  
diboĉas parazito-bandoj  
per ruzŝtelitaj monprofitoj  
precipe en „liberaj“ landoj!

### PACKANTO

Kial sangon homoj stultaj  
verŝas dum milit-terur`?

Kial suferadu multaj  
por alies rabo nur?  
Paco – restu ĉiam ĝi  
la plej alta poezi.  
Ĉiu estas ni ja ero  
el la sama homa gent`.  
Rajtas ĉiuj sen sufero  
kune vivi en konsent`.  
Kial rajtas la fortul`,  
homojn bati sen skrupul`?

Kial al milito treni  
edzon fore de edzin`?  
Kial de etuloj preni  
panon ĝis militofin`?  
Militoj estu for  
por eterna pacfavor`!

Regu paco ĉe popolo,  
ĉie en la homa kor`!  
Ree sonu paca volo!  
Tondroj de milito for!  
Pli belega estas pac`  
ol milito kaj minac`.

Je meznokta jarsekundo  
eknaskiĝu paca jar`;  
resaniĝu ĉiu vundo,  
pro milita malbonfar`!  
La popolo de la mond`  
migru pace en fratrond`!

Militglora epopeo  
estu ĝi por ĉiam for!  
Ni nin savu el perec`  
de sangverŝo kaj angor`  
Kaj plej alta nia pet`:  
restu ĉiam packviet`!

Elsvedigis:  
Karl JOHANSSON – Eksjö

### PAROLOJ NESUFICĀS !

Bovido blekas ĝeme de frua mort  
en la buĉeja korto,  
helpvokas ĝi krurtreme  
pro tim` de frua morto.  
Indignas du virinoj  
kun larmoj pro kompatato:  
„Kruelaj hom-inklinoj!“  
„Terura kultur-stato!“



Sed jam post unu horo  
aĉetas por la festo  
la du en bonhumoro  
viandoj de la besto.  
Foriĝas la suferoj  
ne por kompat-parolo;  
ĝin faras karakteroj kun tre agema volo!

Jos. BURGER, Saarlando

## NEBULO ĈIRKAŬ LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTA KONFERENCO

Estas vere stranga afero, ke en ĉiuj Popoldemokratioj jam oficiale funkcias Esperanto-organizoj nur en DDR kaj Ĉeĥoslovakio ŝtataj organoj ne kapablas ĉi problemon kontentige solvi.

Multaj eble opinias nun, ke la ĉeĥoslovakaj esp-istoj nur blufis la mondon kiam ili publikigis avokon pri la aranĝo de Tutŝtata Esperanto-konferenco en Olomouc la 20-21an de oktobro 1956 en diversaj Esp-gazetoj. Sed fakte niaj gvidantaj k-doj de la tutŝtatata Konsulta Komitato Esperantista (TKKE) ege klopodis kaj fine atingis ricevi antaŭpromeson, ke landa Esperanto-organizo estos permesota tuj post la procedo de tutŝtata konferenco. Krome oni jam pritraktis la proponon de organizaj statutoj (regularon) en la ministeriaj instancoj kaj promesis doni eldopermeson por presita centra Esperanto-gazeto en Ĉeĥoslovakio.

Post tiuj rezultoj kaj en konsento kun la oficialaj instancoj komencis la preparlaboroj por la sukcesplena aranĝo de nia landa konferenco. TKKE eldonis komune kun la urbestro de Olomouc konferencafiŝon, mendis kunvenejojn loĝejojn, eldonis propagandajn glumarkojn kaj disendis aliĝilojn inter la ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Krom tio estis invititaj jam reprezentantoj de multaj eksterlandaj organizoj.

Laŭ niaj informoj jam serioze klopodas rumanaj, vietnamaj, hungaraj, ĉinaj kaj alilandaj gek-doj por ricevi je tiu termino vojaĝpermeson al Ĉeĥoslovakio. Eble 300 ĉeĥoslovakaj gek-doj jam aliĝis kaj antaŭpagis loĝejon kaj konferenckotizon.

Send, en la lasta momento, dense antaŭ la konferenco -bedaŭrinda okazintaĵo:

La prezidanto de TKKE k-do. Jos.Vítek ricevis leteron de la ministerio por instruado kaj kulturo kun jena teksto:

„MINISTERIO *PRO INstruado kaj KULTURO*.

Praha la 19.de sept.56.

Al

Kamarado Josef VÍTEK  
Prezidanto de Tutŝtata K.K.ESP.  
PRAHA-II Jungmanova č.24

Estimata kamarado,

Ĉar montriĝis, ke la traktado pri la propono rilate definitivan solvon de la Esperanto-movado ĉe la koncernaj instancoj verŝajne daŭros pli longe ol oni supozis, mi petas vin, aranĝi, ke la Esp-konferenco kunvokita de TKKE al Olomouc estu prokrastita je nedefiniga tempo. Ĝian daton ni interkonsentos post eldono de definitivaj decidoj.

Mi petas vin, afable aranĝi, ke pri la prokrastita konferenco estu informitaj ĉiuj invititoj.  
Kun kamaradaj salutoj

Ant.*RICHTĚR* pr.m.

gvidanto de la fako por klerigaj entreprenoj kaj institutoj

El ĉi letero evidentiĝas, ke ni ne faris blufon, sed tre verŝajne por nia ministerio ne sufiĉas la fakto, ke Esp-organizoj en aliaj Popoldemokratioj jam ĝuas oficialan subtenon kaj estas eĉ parte financataj. Nek la decidoj de UNESKO el Montevideo ĝin influas, sed ĝi atendas kiamaniere ĉi problemoj estos solvita en Sovjet-Unio.

Ĉi sintenon oni certe povus akre kritiki. Sed ni volas preni distancon de tio kaj petas pardonon ĉe niaj eksterlandaj invititoj kaj paciencon. La Ĉeĥoslov.abonantoj ni petas, ĉar jam ne eblas pri tiu okazintaĵo informi ĉiujn aliĝintojn kaj interesulojn ĉar oktobra „LA PACDEFENDANTO“ jam estas distribuita kaj la venonta povas aperi nur en novembro, ke ili en siaj kluboj kaj rondetoj informigu pri tio kaj konservu disciplinon intertempe atendeman. Ni estu konviktita, ke niaj k-doj en la ĉefurbo pluen klopodas atingi kontentigan rezulton kaj ni estu certigitaj, ke ankaŭ nia registaro ne

kapablos fari ekstra-aĵon kaj frue aŭ pli malfrue favore decidis pri nia afero. Poste la konferenco okazigis en Olomouc ankoraŭ kun pli granda sukceso, se ni intertempe ĉion bone preparos k. organizos.

BURDA

## POR NIA DISTRO

### POR DORLOTI SOLDATOJN

Ĉe kunveno en Einbeck, Saksio (Germanio) reprezentantoj de diversaj loĝantgrupoj diskutis la demando, ĉu la urbo estos garnizona urbo. Reprezentanto de dommastrina *unuiĝo* motivigis sian pozitivan sintenon por la projekto, ke „tiam la virinoj ricevos la eblecon dorloti la junajn soldatojn ataŭ ol la heroa morto trafos ilin“

### ANKAŬ INTERKONSENTO

Laŭ ministroj de la NATO-landoj faris interkonsenton en Parizo. Ili interkonsentis pri tio, ke ne estas eble fari interkonsenton ...

### PRI LA GERMANA ARMEO

Interŝanĝo de replikoj inter Dulles kaj germana generalo\_  
...Ĉar ni nun ekipas Germanion por armiloj, tial ni volas havi garantiojn, ke vi batalos kune kun ni, sinjoro generalo.  
...Kompreneble. Sed vi devas garanti al ni, ke efektive milito okaziĝos.

### ANKAŬ ANONCO

Eta kontraŭmilitisto naskiĝis en Munĥeno, Germanio. La gepatroj anoncis ĉi eventon en ĵurnalo jene:  
„Hodiaŭ alvenis al ni eta kontraŭmilitisto, kiu laŭte protestis kontraŭ tiuj militleĝoj, kiuj estas ratifikaj en Bonn.“

### MALFACILAĴOJ EL LA ĈEĤALINGVO

Provu rapide kaj sinsekve diri jenaj frazojn:

Strč prst zkrz krk. Ĝi signifas: Ŝovu la fingron en la gorĉon.  
Třista třiatřicet stříbrných skřivanů litalo přes třiatřiatřicet stříbrných střech. Ĝi signifas:  
Tricenttridektri arĝentaj alaŭdoj flugis trans tricenttridektri arĝentaj tegmentoj.  
(ř – rŝ ; ý – longsonata i kaj ch estas prononcata kiel ĥ)

-----  
+++++

### LA EKZEMPLO DE WUNCHENSORF / E.

....kiel instruisto mi havas ofte okazon, montri kartojn kaj leterojn ricevitaĵajn el eksterlando. Per tio mi praktike demonstracias al gekolegoj kaj interesuloj, kiam avantaĝon ni havus, se ni grandskale uzus Esperanton por pacaj kaj amikecaj rilatoj. Per mia varbdo tiamaniere konvinkis el mia kolegaro ĝis nun sep gekolegojn, kiuj jam eklernis la lingvon. Ĉar nia kolegaro konsistas el 22 geinstruistoj, mi estas treege kontenta pri tiu rezulto. Krom tio ankaŭ kelkaj aliaj amikoj en mia loĝloko komencis studadon. Entute ni nun estas jam 10 gesamideanoj. Nia urbo havas 5.000 loĝantoj kaj ni planas kurson en popolaltlernejo ekde septembro. Ĉiuj miaj novarbitaj amikoj korespondadas kun eksterlando. En malgranda packspozicio ni montris kartojn kaj leterojn el pli ol 22 landoj. Ni interrilatas ankaŭ kun sovjetaj gek-doĵ, precipe el Kiev, *Nijneudinsk*, Leningrad,

Moskvo kaj Tomsk en Siberio.

Flanke de nia estro por popolklerigado ne estas dezirate, ke nia lingvo estu aplikata. Ni jam ofte diskutis pri tiu problemo kun diversarj ŝtataj funkciuloj, sed preskaŭ ĉiuj kontraŭstaras nian klopodon rilate al Esperanto. Estus treege grave, se amikoj el tuta mondo skribus al la ŝtataj oficejoj kaj funkciuloj en nia respubliko por ke ili ekkonu, ke nia lingvo estas bonega ilo por interamikigi kaj pacigi la eterne militantan mondon. Jen kelkaj adresoj al kiuj vi povas skribi por helpi al ni :

*Innen*ministerium der Deuten Demokratischen Republik. Herrn Paul Wandel, BERLIN.

2.) Ministerium für Volksbildung, Herrn Minister LANGE, BERLIN, DDR

3.) Deuter Friedensrat Generalsekretär WILLMANN, BERLIN, Deute Demokratische Republik.

Viaj letero certe grave impresos.

Akceptu nian koran dankon!

(mi petas kopiojn de viaj leteroj)

Gerd GERHARDT, instr.

Brunnenstr.3, WUNSCHENDODRF/Elstr.Kr.Gera, Thüringen-GermanioDDR

### SAVITA PER ESPERANTO

La 21. de majo 1940 mi estis en urbo AÛBIGNY EN ARTOIS. Soldatoj de la invada germana armeo venis tien kiam vesperiĝis. La sekvantan matenon ili arestis multajn civilulojn mi mem estis unu el la arestitoj.

Ni devis stari apud muro tenante la brakojn supren.

Apud mi estis Belgo kaj Alĝeriano.

La Belgo estis esperantisto kaj mi mem jam lernis iomete Esperanton, sed mi ne estis ankoraŭ perfekta. Ni do interŝanĝis kelkajn vortojn en Esperanto.

Subite germana *gardstaranto* alproksimiĝis al ni kaj demandis nin esperantlingve:

- Ĉu vi estas esperantistoj?

- Jes.

- Bone, mi tuj klopodos helpi vin forkuri, ĉar via grupo estas elektita por esti mortpafita.

Poste li foriris.

Proksimume unu horon post tiu interparolado, en la momento kiam la arestitoj atendis, kiel oni pune batas sur la femuron de unu el la arestitoj pro tio, ke li mallevis la brakojn, mi sentis min tirata malantaŭen.

Rapide mi turnis la kapon kaj rekonis la germanan soldaton kvankam li ne plu portis la kaskon.

Li faris signon al ni, ke ni faligu teren kaj rampu malantaŭen.

Tion ni faris.

Rampinte ĝis malantaŭ la proksimaj domoj, ni dankis nian savanton per rapida manpremo kaj forkuris tra la kamparo.

Poste mi eksciis, ke 141 civiluloj estis mortpafitaj tiun tagon.

Dank' al Esperanto miaj du kamaradoj kaj mi mem estis savitaj.

A.J.BAYARD

8,rue du Marais, NOYELLES s.LENS (P-de-C) Francio

### RADIO-BUDAPEST PRI „PACO“

Pri la bonsukcesa aŭgusta n-o. de „PACO“ el Hungario (Szeged) la hungara radio du foje parolis inter la vespersciigoj la 16. kaj 17. de aŭgusto.

Krom tio kelkaj gazetoj menciis ĝin: La budapesta ĵurnalo de la Sindikata Konsilantaro „NÉPSZAVA“ kaj 5 provincaj ĵurnaloj. El tiuj la „DÉLMAGYAROSZÁG“ (Sudhungarlando), la ĵurnalo de la partiokomitato en urbo Szeged publikigis ties tutan enhavon.

Pál BALKÁNYI

### ALVOKO

En la n-o. 29-30 de „PACO“ estis publicita letero de Maxim Gorkij al k-do. Kirjuŝin en Minsk

Ĉu estas eble ricevi fotokopion de tiu ĉi letero kaj kiom ĝi kostus? La fakto, ke M.Gorkij tiel simpatiis kun Esperanto kaj esprimis tian favoran prijuĝon, ŝajnas al mi tiel grava, ke ĝi meritas esti grandskale inter la publiko propagandata.

Post ricevo de via afabla respondo mi preparos ĉion necesan.

Ĉu estas eble ricevi la adreson de k-do.Kirjuŝin, kiu eble povus al mi prizorgi fotokopion de la membrokarto de M.Gorkij. Ĉio ĉi ja estus grava dokumentaro por la historio de nia movado.

Fritz MICHALEK

NOSSWITZ 57 über Rochlitz (Sachs)

Germanio – D.D.R.

## LA SITUACIO ŜANĜIĜIS

Antaŭ kvin jaroj la pacmovado en Japanio estis prezentita kiel „Kvina Kolono de Ruĝuloj“ kaj tiuj, kiuj kolektis subskribojn por malpermeso de atom-kaj hidrogen-bomboj estis persekutitaj kaj de la polico. Kiel estas hodiaŭ?

Meznombre du Japanoj el kvin subskribis la postulon por malpermeso de atom kaj hidrogen-armiloj.

H. I i t o

## VORTOJ DE NEDERLANDANO AL LA „MEM“anaro

Sidante en mia ĉambro mi trarigardas la fenestron.

Ekstere pluvas kaj melankolion kreas la aspekto de la naturo. En mia kapo ekestas la komparo. Komparo inter la veteraspekto kaj la nuna mondo. Cerbumas mi pri la malĝoja, melankolia sfero reganta en la animoj de la homaro pro la timo pri ebla mondkatastrofo atombomba.

Pledante la vento ĉirkaŭfantomas la domon. Kvazaŭaj plendoj de homamasoj, malproksiaj. Vortintoj, falintaj per la diablo, kiu nomiĝas milito, minacanta la homaron kaj ĝin maltrankviliganta.

Subite levas sin en mia cerbo la vortoj de nederlanda proverbo:

„La sopiro estas la patro de la penso“. Ne rikanas mi plu, ĉar profunda kompatio enlokiĝas mian animon. Varmaj larmoj kvazaŭ gutfalas en mian koron. Ili plidolĉigas la rikanojn.

Ho, bonola sed ĝis nun nepova homaro. Ho, malbenita miskomprenado inter la popoloj. Sed mi atentu! Ekstere dum momento kelkaj sunradioj trarompas la nigran nubaron. La tero dorlotetiĝas pere de la sunradioj. La aspekto de la tero iom ŝanĝiĝas kaj pere de la sunradioj pli beliĝas. Brileto kuŝas sur arboj, arbetaĵoj kaj domoj. Sunradia merito.

Denove mi faras komparon, meditante pri ni la idealo de nia „MEM“ kaj pri la belega idealo de nia majstro. Kvazaŭ suno la zamenhofa idealo ankaŭ trarompas la nubaron nigran, la minacan nubaron, la nigran militnubaron. Estas ankoraŭ tre malmultaj briloj, kiujn ĝi elradias, sed tamen iom ili dorlotas. Mallaŭte sonas la voĉo de la paco, sed ĝi sonas kvazaŭ sonorileto arĝenta. Kaj iam potence eksonos la voĉo de la paco.

Vere la homaro ne volas militon!

Infanvoĉoj postulante pacon, sonis el Japanio al ni. Akuzintaj voĉoj. Pluraj junulvoĉoj sonis. Jen la jama tagiĝo, la tagiĝo de la paco.

Ni laboru, ni persiste laboru ! La sindono de nia majstro, bonkora humana kaj pacamanta, postulas tion de ni !

A.A.Leenhard  
BUŜUM-Nederlando

## NI ALVOKAS

Ĉiujn izolajn kolektantojn, grupojn kaj jam organizatajn societojn, kies spec.fako rilatas kolektadon de poŝtmarkoj, il.poŝtkartoj, glumarkoj, alumetetiketoj, moneroj, medaloj ktp. por plenkonsente kun tiuj societoj prepari la fondiĝon de internacia asocio aŭ unuiĝo de kolektantoj kaj tia maniere kunigi la ĝis nun disigitajn klopodojn de ĉiuj. Poste ni klopodos eldoni grandkvantan internacian revuon por malalta prezo kun ampleksa kaj varia enhavo, laŭeble komence de 1957.

Por tiu celo ni petas ĉiujn kolektantojn, grupojn ktp. sendi al ni siajn kritikojn kaj sugestojn. Ĉiu el ili ricevos niajn inform-bultenojn (se eble aldonu kelkajn resp. kuponojn aŭ p.m. por ke ni povu parte kovri niajn elspezojn). Skribu tuj al k-do. DALET / E.K.I.K-membro n-o.56, estrarano de franca „Internacia Filatelista Unuiĝo“ membro de Int.As.de Poŝtmarkkolektantoj/79 bis rue du Chateaux, ASNIERES, Francio aŭ al k-do RIBOT ĝen.sekr.de Unio Esp-ista Franca, 11 rue P.Vergnes MARMANDE/Lot a Garonne/Francio.

## R E C E N Z O J

EZOPA SAĜO, verse reverkita de K.Kaloczay, bele tolbindita de Börge Hamberg sen streĉo ilustrita poemaro sur 125 paĝoj de bela papero aldonita de Konversacia Klubo „Ko-Ko“, Kopenhago. Prezo 15 Steloj aŭ 1.30 usa-dolaroj.

Firme konvinkite, ke la ĉefa tasko de Esperanto ne estas literatura, mi nun diras, ke mi priplendas la eldonon de tiaj verkaĵoj kia estas la nun recenzata. Ili ja donas nuntempe ankoraŭ mortigan venenon al la lingvo de la universala demokrateco, kio Esperanto estu kiel ĉiama helplingvo. Ĝi ne estu *arcanum*, ne adepta sekretigema klaro kiel jam la latino, fariĝinta la apartiga idioma de la solenco kaj supera klaso de la socio, la franca de la diplomataro, la angla, tiu de la komerco, aŭ krimula faklingvo. Esperantistoj, kiuj tiel tumultas per nia lingvo, estas musoj ĝin ĉirkaŭmordantaj aŭ termitoj detruantaj. Tial laŭ mi estus pli bone, se K.K. ne plu estus reveninta al ni, la artisto-deloginto de aliaj imitemaj talentuloj. La libro ja faru ĝuebla la rifuzindan. Suplementon, kies vera patro estas K.K. skribinta la Parnasan Gvidlibron. Mi rezignas nomi la multajn novvortojn, kiujn K.K. uzis por la elektitaj ritmoj *krimoj*, difektinte eĉ la Fundamenton. Kion dirus K.K. kontraŭ fuŝinto de verko lia? Pri la bedaŭrinda devojiĝo de K.K. kulpas ankaŭ tiuj flatemuloj, kiuj sciis



lin nur glorigi eĉ pro liaj lingvaj kapricoj. Ankaŭ ĉi rilate malbona efiko de la kulto al persono, nuntempe ĝuste en lia lando kondamnita. Kiel konscia kaj konscienca esp-isto mi tial ne povas rekomendi tiun ĉi libron, bedaŭ rinde precipe, ke la saĝo de Ezopo mem ankaŭ estas trafota de mia averto. La libro certe plaĉos al eruditaj literaturamantoj inter ni, da kiuj tamen estas tre malmultaj por rekompenci la kuraĝan entreprenon de KoKo. Tial mi esprimas al la eldonejo mian sinceran bedaŭron pro tia malŝparo de ĝiaj rimedoj. Treege domaĝe, ke K.K. ne sufiĉe klopodis verki per la originalaj elementoj de Esp-o, serĉinte kaj trovinte la propran poezion de Esp-o, kiu ja ne povas esti nur imito.

Dr.A.HALBEDL

Martinus: „KIO ESTAS LA VERO „, el la dana originalo trad. C. Graversen, kontrolita de Lit.Kom.de SAT 13x19 cm, 95 paĝoj. Plaĉa verda tolbindaĵo kun orpresita emblemo. Eldon. la Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, KOPENHAGO F. Danlando. Prezo 6.50 dan.kronoj.

Ĉi tiu libro, modele *tradukita-tia* Esperanto estas vere refreŝiga en nia epoko de kontrabandata Idismo – estas verko da estetika kaj etika raciismo kaj pro tio enhavanta gravegajn erarojn, kiuj povas erarigi ĝuste tiujn, kiuj fieras pro sia intelekto. Ĝia estas kontraŭvole malapologio de la religion, kiun ĝi taksas nur kiel intertempan, kvankam respektindan apogon de la celado al vero kaj vivo laŭ la kompreno de la cetere altestiminda aŭtoro.

Novvortoj dankinde malmultas. La trovitaj estus ankaŭ anstataŭeblaj-kaj-indaj: Iniĉiĝo = vok/it/eco-igo, preskribi = ordoni /kial ne antaŭskribi?/, superstiĉo = falskredo, inflacio = mona devaloriĝo, perturbo = konfuzo, treti = suriri-piedpremi, *procezo* / fonetika ĝena/ = procedumo. Strange impresas sur p.78: „Neniu ... ol tiu, kiu ...“

Unu sola preseraro sur p.59, linio: 3a: epoke.

Koncize: La libro estas lingve tre rekomendinda, sed enhave taŭgas nur por religie firmaj kaj filozofie eruditaj personoj, aliaj animan malutilon.

D-ro.A.HALBEDL

### EPISODO DUM LA HITLER REGADO

Dum la milito en majo 1942 mi estis politika kaptito, sed ne ĉesigis pro tio mian esperantistan kaj kontraŭfaŝistan propagandon.

Enŝlosita en la kazerno de Charleroi en Belgio mi tiam interkonatiĝis kun ĉe mi gardostarinta germana soldato kaj tuj komencis propagandi apud li.

Li klarigis, ke li neniel ŝatas la militan uniformon kaj ege dezirus reiri hejmen. Tiam estis tre danĝera por li, paroli kun politika malliberulo.

Malgraŭ tio li restis mia amiko kaj klopodis diversmaniere dolĉiĝi mian malliberecon kaj tiun de miaj samgrupanoj. Ĉion li faris senpage. Ĉefe li fidis al mi.

Kvankam malpermesite, li donis al mi sian nomon: Fritz JOBT, lia aĝo povas esti nun ĉirkaŭ 50jara. Samtempe li malkaŝis, ke antaŭ la soldatiĝo li estis okupita ĉe la Societo por filmproduktado U.F.A. en Berlino.

Post kelka tempo ni interkonsentis serĉi okazon, por fuĝi el tiu ĉi stato; mi kiel malliberulo kaj li kiel deviga faŝista soldato. Li estis preskaŭ malliberulo kiel mi.

Bedaŭrinde oni lin suspektis kaj translokigis al malproksime por deĵori dum nia grupo estis transportita al Kastelo de Huy. Tio malebligis nian projekton.

Ja de jaroj mi sereĉas kontakton kun Fritz JOBT, sed vane. Ĉu iu povus helpi al mi, trovi ĉi malnovan amikon aŭ informi min almenaŭ pri lia sorto?

Mi antaŭe dankas kaj esperas

Mia adreso: Profesoro, DELFORGE, BOUILLON, Belgio

## NOVAJ SUKCESOJ EN DDR

En FREITAL ĉe Pirna-Copitz instruisto Leichert, ric.ofic.permeson aranĝi Esp-koresp.rondon. Aliĝis jam 100 infanoj el 9 klasoj. Mi kolektis adresojn de 77 germ.Esp-instruistoj.

Paul Glöckner - DDR

-19 -

### EL LA SEKRETARIEJO:

Nova MEM-perantino. K-dino. Maria GRÜNIG, Sahlistr.57, BERN, Svisio afable akceptis funkcion de MEM-peranto por Svisio. K-dino Grünig estas membro de UEA, reprezentantino de la INTERNACIA ESP-MUZEJO kaj sekretario de la Esp-grupo en Bern de 1950.

Kun k-dino Grünig la perantoj de MEM atingis la nombron 29.

Al la nova perantino ni deziras grandajn sukcesojn „per Esperanto por la mondpaco!“

El Ĉinio: La intereso por nia movado en tiu granda lando daŭre kreskas. Niaj rilatoj tie bone evoluas kaj ni esperas, ke tre baldaŭ ni povos anonci adreson de ĉina MEM-peranto kiel la 30an.

### ADRESOJ DE LA MEM-SEKRETARIEJO

Ĉefsekretario: Ant.BALAGUE, Kirchenweg 12, SANKT PÖLTEN, Aŭstrio

Helpsekretario: K-do. Karl KVIST, Box 109 A, DEJE, Svedio.

Centra redaktoro: K-do. G.HOLMKVIST, Rönneholmsvägen 55, tr.2, MALMÖ-V, Svedio.

### LIBRO-RECENZO

Mi mencias en „PACO“ ĉiun esper.libron kaj broŝuron de kiu ni ricevos po unu ekzemplero. Pri du-ekzemplera ricevo ni faros krome recenzon. Sendu al: D-ro. A.HALBEDL, Schmittgasse 15, KNITTELFELD, Aŭstrio.

### ANONCU EN „PACO“ !

Prezroj: Anonco ĝis 25vorta por abonantoj 2 resp.kuponojn por neabonantoj 4. Por ĉiuj pluaj ses vortoj 1 resp.kup. Pagu ĉe via landa peranto.

### AL ĈIUJ REDAKCIOJ

Ni volonte akceptas interŝanĝon de PACO kontraŭ via gazeto. Bonvolu sendi al: Karl KVIS, Box 109 A, DEJE, Svedio

### TRADUKU !

La pacesperantistoj ne sufiĉe atentis la signifon da tradukado el „PACO“ por siaj tagaj kaj fak.gazetoj. Do ek al la laboro, sed ne forgesu indiki la fonton.

### POR VIA KORESPONDADO

Ĉiam preferu uzi skribpapirojn, kovertojn kaj p.k.eldonitajn de MEM. Mendu de via peranto aŭ rekte ĉe nia ĉefsekretario en Aŭstrio.

### INTERŜANĜO DE INFANAJ DESEGN- kaj -PENTRAĴOJ

Gek-doj en la Kjusju-distrikto de Japanio aranĝos ekspozicion de geknabaj desegnaĵoj kaj gazetoj kun helpo de la loka ĵurnalo „HU-KUNIĈI“ por memorigi la 50-jaran jubileon de la jap. Esp-movado.

„HU-KUNIĈI“ intencas aranĝi konkurson de tutdistrikt. infandesejnaĵoj kaj ĉ 300 elektitajn interŝanĝi kun eksterlandaj geknaboj.

Instruistoj-eduktistoj tuj kolektu kaj interŝanĝu kun ni. Tio signifas por niaj infanoj edukon al paco kaj translima amikeco! Nia adreso: Hukuoka Esperanto Societo, k-do.Satō Etuzo, Koy-tyo-3-40-2, HUKUOKA, Japanio.

#### KORESPONDI DEZIRAS:

K-do. Zdeněk ANTOŠ, ROKYCANY-III/8, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj kaj ŝakludi letere.

K-dino. Růža KOČENDOVÁ, Bílá č.2, OSTRAVA-III, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj per let. kaj il.p.k

K-do. Michal MASTALÉŘ, Křižíkova 15, OSTRAVA-I, Ĉeĥosl. per let. kaj il. pk.

K-do. Arsenio V.POPOFF, per Plechanova 24, TOMSK, Siberio, Sovjetunio, suferas altan sangpremon, bezonas medikamenton „SERPASIL-O.10“. Alsendo rekompencota laŭ via deziro.

K-do. Rud.BURDA, Palackého nám.č.6, PLZEŇ, Ĉeĥoslov., interŝ.po 20-25 cigaredoj, gladigitaj inter du bild kartoj en rekomend.let.kun ĉiuj landoj, escepte Popoldemokratioj.

K-do. Endel GJASILD, (22j) Kalevi 13 TARTU, Estonia S.S.R., k.ĉ.l.,il.pk.

K-do. Toomas SULLING, Kalevi 13, TARTU, Sovjet-Estonio, per il.p.k. pri sporto kaj aliaj temoj.

K-do. Zdeněk RALIŠ, ŽIVANICE č.60, okr. Přelouč, Ĉeĥoslov., kun ĉ.landoj pri radioteniko k.aliaj temoj. Interŝanĝas gazetojn ktp.

K-do. Otakar OTRUSINA, Braunerova 13, OSTRAVA-Hulváky, Ĉeĥoslov.kun ĉ.land.

K-do. Jos. BERNADY, Tř.1.Máje 14

K-do. Andrej SIDOROV, Ul. Nekrasovo 12, KRJUKOVO, Raj.Ĥimki, Moskovskaja obl., Sovjet-Unio, nur pri tradukado de esperantigita literaturo en naciajn lingvojn.

Daŭrigo sur paĝo 20a

Ni petas pardonon de niaj raportistoj, ĉar kelkajn artikol.neblis publikigi pro manko da loko k. papero. Kelkaj jam fariĝis neaktualaj.

K O R E S P O N D I D E Z I R A S :

- K-do. Ladislav PROSKOVEC, PLZEŇ, Pod.Chlumem 6, Ĉeĥoslov. pri kremacio, interŝ.  
propagandilojn, fotojn pri kremacio kaj krematorioj, kun ĉ.1 per let. kaj il.p.k. Nepre respondas.
- K-do. Ing. Josef MLNAŘÍK (28j.fraŭlo), Skrétova ĉ.17, PLZEŇ, Ĉeĥosl., pri div. temoj kun ĉ.  
landoj per leteroj kaj il.p.k.
- K-do. Kenzo Yoŝida, Oosakaya, Tokio-Ŝiten, 6-1 Lida-machi, Chiyoda-ku, TOKIO, Japanio (40j.  
komizo)
- K-do. Hideo OOTAKA, (25j, laboristo) c/o *kenzaburo* Fukano, 27-2 Toyotama-kami, Nerima-ku,  
TOKIO, Japan.
- K-dino. Hoáng-thi Viñh (instruist.) *Giaovien* Trung hoc Trungvuong, HANOI, Vietnamo
- K-do. Bui-bang Doan, (oficiro) E570, F:330, Bttqdva, HANOI, Vietnamo.
- K-dino. Nguyen-thi Yěn, (50jara) direktorino, Liceo Trung Vuong, HANOI, Vietnamo.
- K-do. John B.NILSSON, Box 441, BROMOLLA, Svedio, precipe kun k-doj. el Sov.Unio, prefere  
moskvanoj pri ĉiuj temoj, interŝ.il.p.k. gaz., poŝtmarkojn ktp.
- K-do. TÓTH Bertalan, Árpád u.7, KISTARCSA, Hungario, (oficisto en Budapeŝto) kun ĉ.landoj kaj  
interŝanĝi il.p.k.
- ĈERVENÝ KRÍŽ (org.de Ruĝa Kruco), Štolcova ĉ.29, BRNO-18, Ĉeĥoslov., dez.kontakti kun  
tutmondaj Ruĝ-krucanoj. Skribu multnombre!
- K-dino. Věra ROUČKOVÁ, Třída Ĉsl. Legii ĉ.7, OSTRAVA-I, Ĉeĥoslovak (studentino) kun ĉ.  
landoj pri ĉ. temoj per let.kaj il.p.k.
- K-do. Abelardo Duch, Jesus del Gran Poder No.2, la.A. MADRID, Hispanio (32j.laboristo) kun ĉiuj  
landoj.
- K-do. A. KUBULNIEKS, p.n. Liebkalne, Erglu raj. Liebkalnes 7-g.Skola, Latvia S.S.R., kun  
geinstruistoj-lingvistoj, precipe el Popoldem.
- K-do. Andreas DORO (instr.) BOŤANY, poŝta BIEL, okr. Král.Chlumec, Ĉeĥoslovakio, pri  
geografio, natur-scienco. Interŝ.il.p.k. kun popol-kostumoj, p.m. kaj gramofondiskojn.
- K-do. Ing. Vladimír Mioduŝevskij, Verĥnij Val 54 kv.58, KIEV, USSR kun ĉ.land. pri Esp- kaj  
pacmovade.
- K-do. Karel SCHWARZ, Kaplířova ĉ.8, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj land. pri astronomio per  
let. kaj il.p.k.
- K-do. Josef KAISER, Hradiště ĉ.28, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per leteroj kaj il.p.k. kun ĉiuj landoj.
- K-do. Josef LOKAJ, (22j.fraŭlo) POCÍNOVICE ĉ.147 u Klatov, Ĉeĥosl., kun ĉ.landoj per let. kaj  
il.p.k.
- K-do. Ilvano MANIAS, Metia Desegno-lernejo, Esperanto-grupo, AZZANO-X, (Udine) Italio, por  
30 miaj lernantoj, per il.p.k. kun ĉiuj landoj.
- K-do. GOUZIN W, DEBNO, Ul. Szava 1, woj. Szczecin, Polio, pri historio, ekonomio kaj  
lingvoscienco.
- K-do. Doan-quang Tinh, profesoro de Esperanto, Liceo Chu-van-An, HANOI, Vietnamo.
- K-dino. Vu-bich Nga, Liceo Trung Vuong, klaso 2 A, HANOI (18jara) komenc.
- K-dino. Ng-thinDong-mai, Liceo Trung Vuong, klaso 3 C, HANOI, Vietnam (20j.)
- K-dino. Nguyen-thi Chi, profesorino Liceo Trung Vuong, HANOI, Vietnamo.
- K-do. A. BAYARD, 8 rue de Marais, NOYELLES SOUS LENS, P.D.C., Francio, (36j. asekur.  
sekretario) per il.p.k. kun ĉ. landoj, ankaŭ france, kiu dez. perfektiviĝi en tiu lingvo.
- K-do. Fancsali Sándor, Széchenyi 19, SZOLNOK, Hungario, aerpoŝtmark-kolektanto, kun la tuta  
mondo.
- K-dino. Ali ZDRAŽILOVÁ, L. Ševčíka 17, OSTRAVA-XX, Ĉeĥoslovakio, pri ĉiuj temoj, per  
il.p.k., let. kun ĉ. land.
- K-dino. Zdenka PÁNKOVÁ, Sídliště 365, PORUBA u Svinova, Ĉeĥoslov., kun ĉ.landoj per il. p.k.  
kaj leteroj. Peter ANSO

K-do. Peter ANSO, Kastani 24-1, TARTU Estonia S.S.R. pri ĉiuj temoj.

K-do. Vratislav KUČERA, Pošt.schr. 61 PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj, interŝ.il.p.k.,p.m., alumetetiket.

K-do. Frant. ZOLD, (studento) STREDA n/Bogrodom, okr. Král. Chlumeč, Ĉeĥoslovakio, kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Interŝ. il. p.k.

K-do. Inĝ. Mikaelo VAIL, (50j.) Niĵnij Val 19 kv.7, KIEV, U.S.S.R., kun ĉiuj landoj pri Esp-o kaj paco.

K-do. Sterjo Z.KUKUSEV (ĉefagronomo) Maŝin-Traktora Stacio „BELOZEM“, PLOVDIV-2, Bulgario, por la rondeto kun agronomoj, maŝintraktorstacioj kaj agrikult. Kooperativoj el ĉ.l.

-----  
Eldonis: Okresní výbor obránců míru - odbor esperantistů – MIKULOV

Redaktis: k-do. Rudolf BURDA, Palackého nám.6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio  
-----